

LA ANĜEVA FOLIO

LA FEUILLE ANGEVINE



**DU 25 JUILLET
AU 1er AOUT**
**Le Congrès Universel
de Lille**

Ek al Lillo kunkantante !

Kanti estas socia ago per kiu oni esprimas siajn emociojn, oni transdonas mesaĝojn. Ĉu ribel- aŭ am-mesaĝo, ĉu ĝoja aŭ malĝoja, kantado plibeligas la vivon, vibrigas per sonoj onian tutan eston, korpon kaj animon, kaj unuecigas la korojn.

Por la venonta UK en Lillo, La Kompanoj, FaMo kaj Marcelo Redulez impulsis entuziasmigan projekton : grupa kantado surstrate kaj sursceneje. Ili elektis repertuaron de famaj francaj kanzonoj kaj originalaj esperantaj kanzonoj bonhumoraj.

La kantaro estas tre diversa kaj ebligas al ĉia emocio sin esprimi. Jen kelkaj titoloj : "Kiam restas am' sur ter" (Quand on n'a que l'amour) far Jacques Brel, "Lili" far Pierre Perret, "Kisu min ankoraŭ foje" far Raymond Schwartz, "La kongresurboj"... Mi aparte ŝatas "Kiam regos am' sur ter" aŭ "La dizertonto" kiuj gustumigas al mi la belecon de la kristana sinteno.

Paske dum unu semajno, ĉirkaŭ 40 Esperantistoj kuniĝis en la kastelo de Greziljono por prepari spektaklon (kadre de Interkant') kaj kantadon (kun la Kompanoj) por la UK. Ĉiumatene dum 30 minutoj, sub la lerta gvido de Françoise Meriaux, la du grupoj praktikis korpoekzercadon kaj varmigadon de la voĉo. Ni tiam estis en bona etoso por eki la kantadon.

Poste, sub la gvido de FaMo kiu ludas akordionon kaj helpe de Pierre Bouvier (kontrabaso), Françoise Noireau (violono), kaj Pierre Libbrecht (gitaro), ni kunkantis diligente, laboreme kaj bonhumore. Kvankam tiuj muzikistoj

maloftege laboras kune, ili tamen profesinivele nin akompanis.

Plie, tre kortuŝis min ke nia ĉefa gvidanto, FaMo, estas nevidanto.



Ĉu oni povas imagi kiom da tempo li devas pasigi por parkerigi la partituron ? Li kapablis atentigi nin lerte kaj saĝe kiam estis vorto malfacile elbuŝigebla en rilato kun la muziko... Se iu el ni iom tro starigis demandojn, li kapablis pedagogie, firme kaj afable reenigi nin en la kantadon. Iun vesperon ni kantis karaokece helpe de estetika lumbildaro fare de Marcel Redulez, kiun li prezentos en Lillo.

Tiu staĝo konfirmis ankoraŭfoje ke mi faris bonan elekton lerni la internacian

En avant à Lille en chantant !

Chanter est une activité sociale par laquelle on exprime ses émotions, on transmet des messages. Que ce soit un message gai ou triste, d'amour ou de révolte, le chant embellit la vie, fait vibrer par le son notre être tout entier, notre âme, et unit les cœurs.

Pour le prochain congrès universel à Lille, la Kompanoj, FaMo et Marcelo Redulez ont initié un projet enthousiasmant : chanter en groupe dans la rue et sur scène. Ils ont choisi un répertoire de chansons françaises connues et de chansons en espéranto originales et gaies.

Le répertoire est très varié et permet à chaque type d'émotion de s'exprimer. Voici quelques titres : "Quand on n'a que l'amour" de Jacques Brel, "Lili" de Pierre Perret, "Kisu min ankoraŭ foje" de Raymond Schwartz, "La kongresurboj"... J'aime particulièrement "Kiam regos am' sur ter" ou "La dizertonto" qui me fait goûter la beauté de l'attitude chrétienne.

Pendant la semaine de Pâques, environ 40 espérantistes se sont réunis au château de Grésillon pour préparer un spectacle (dans le cadre de Interkant') et des chants (avec la Kompanoj) pour le congrès universel. Chaque matin pendant 30 minutes, sous la brillante direction de Françoise Meriaux, les deux groupes ont pratiqué exercices physiques et échauffement de la voix. Nous étions alors dans une bonne ambiance pour commencer à chanter. Puis, sous la direction de FaMo à l'accordéon et avec l'aide de Pierre Bouvier (contrebasse), Françoise Noireau (violin) et Pierre Libbrecht (guitare), nous avons chanté ensemble consciencieusement, avec ardeur et dans la bonne humeur. Bien que ces musiciens jouent rarement ensemble, ils nous ont accompagnés avec un niveau professionnel.

De plus, ce qui m'a très touché est que notre guide

Ek al Lillo kunkantante !



lingvon. Ni, Esperanto-parolantoj, povus fieri kantadi ne nur nacilingve sed ankaŭ esperantlingve. Ni semu kun amo kaj muziko por kvietigi nian mondon.

Se vi ŝatas kanti, eĉ se vi ne partoprenis la staĝojn, venu kunkanti surstrate en Lillo. Por vin prepari :

<http://lakompanoj.free.fr> (repertuaro, muziknotoj, kaj sonregistraĵoj). Ĝis en

la UK. Kaj eble ni daŭrigos tiun kant-aventuron post la UK...

La 50-paĝa broŝuro kun la tekstoj kaj la partituroj estas akirebla kontraŭ 5 €, + sendokosto se vi mendas ĝin ĉe Marcelo Redulez - Chemin de l'Hortie 33880 Cambes. Pliaj informoj ĉe FaMo, fabricemorandea@gmail.com

principal, FaMo, est aveugle. Peut-on imaginer combien de temps il doit passer pour apprendre par coeur les partitions ? Il fut capable de nous avertir habilement et sagement quand un mot était difficilement prononçable en lien avec la musique. Si l'un d'entre nous posait un peu trop de questions, il savait avec pédagogie, fermement mais aimablement nous ramener au chant. Un soir nous avons chanté en karaoké avec l'aide d'un joli diaporama de Marcel Redulez qu'il présentera à Lille.

Ce stage a confirmé une fois de plus que j'ai fait le bon choix d'apprendre la langue internationale. Nous, espérantophones, pouvons être fiers de chanter non seulement dans notre langue maternelle mais aussi en espéranto. Nous semons avec amour et musique pour rendre notre monde plus calme.

Si vous aimez chanter, même si vous n'avez pas participé pas aux stages, venez chanter dans la rue à Lille. Pour vous préparer : <http://lakompanoj.free.fr> (répertoire, partition, et enregistrement). A bientôt au congrès. Et peut-être continuerons-nous cette aventure en chansons après le congrès...

La brochure de 50 pages avec les textes et les partitions est disponible pour 5€ + frais d'envoi si vous la commandez à Marcel Redulez – Chemin de l'Hortie 33880 Cambes. Plus amples renseignements à FaMo : fabricemorandea@gmail.com

Bruno Robineau
www.voyage-tourdu monde.com

Interreta TV-elsendo pri la malfermo de la Universala Kongreso en Lille !

Unuafoje en la historio de la Esperanto-movado, eblas spekti la solenan malfermon de la Universala Kongreso de Esperanto per interreto.

La LKK de la UK filmos kaj interrete elsendos la solenan eventon. Ĉar tia elsendo okazos la unuan fojon kaj mankas ankoraŭ spertoj pri la realigo, povas aperi diversaj teknikaj problemoj – kvankam oni kompreneble klopodas solvi kaj eviti ilin.

La rekta adreso por spekti estos sendota per retroŝto al la dezirantoj, kiuj registros sian retadreson ĉe la paĝo :

<http://blog-bilinguisme.fr/produits/uk2015malfermo/>

La solena inaŭguro de la Universala Kongreso komenciĝos je la 10-a horo la 26-an de julio - Detalaj informoj estas troveblaj ĉe : <http://uea.org/kongresoj/>

L'ouverture du Congrès Universel de Lille filmé et visible sur internet !

C'est la première fois dans l'histoire du mouvement espéranto que l'on pourra suivre sur internet l'ouverture solennelle du congrès universel.

Le comité d'organisation du congrès essaiera de filmer et de télécharger l'évènement sur internet. La réalisation manque encore d'expérience et divers problèmes techniques pourront apparaître - bien que, naturellement, tout sera fait pour les éviter et les résoudre.

L'adresse pour pouvoir visionner sera envoyée par courriel aux demandeurs qui auront enregistré leur adresse de messagerie à la page :

<http://blog-bilinguisme.fr/produits/uk2015malfermo/>

L'inauguration solennelle du congrès universel débutera à 10h le 26 juillet. Les informations détaillées sont visibles sur : <http://uea.org/kongresoj/>

La kanto-taĝoj en nia regiono

La 21-an de marto okazis, en Angers, tago de kantado sub la gvidado de Famo (Fabrice Morandea), por prepari la Universalan Kongreson en Lille. Ni dankas Jeanik kiu zorgis por trovi taŭgan salonon kaj organizi la restoraciadon. Ni estis bone akceptitaj kadre de la studenthejmo Darwin. Geesperantistoj el Tours, Le Mans, Angers kaj proksimaj vilaĝoj de nia departemento partoprenis. Fervore kaj emocie, ni studis kaj kantis Esperante la repertuaron de francaj kanzonoj proponataj de la grupo "La Kompanoj" (18 kanzonoj selektitaj). Dankon ankaŭ al Fabrice kiu, arde kaj pasie, akompanis nin per sia akordiono.

Aliaj kunvenoj, similaj al tiu de Angers, okazis :

- En Greziljono dum reciprokaj staĝoj de la Kompanoj kaj de la koruso Interkant'



100^a Universala Kongreso de Esperanto
Lillo (Lille), Francio
25 julio – 1 aŭgusto 2015
 Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj

De la unua... ek al la centa!

 www.lille2015.fr 

(vidu raporton far Bruno Robineau "Ek al Lillo kunkantante", paĝo 2),

- En Tours, en salono de la Haloj, la 30-an de majo. Ni multe dankas la lokan Esperantan klubon kiu tre afable akceptis nin en gaja etoso (3 anĝevanoj

partoprenis). La muroj de la salono vibris pro emocio ! Grandkvante niaj geamikoj antaŭe preparis manĝaĵojn, kaj dolĉaĵojn. Apartan dankon al Jeanne kiu malkovrigis kaj regalis nin per loka kuko de Touraine : la nugato de Tours.

Les journées chant dans notre région

Le 21 mars, à Angers, a eu lieu une journée de chant sous la direction de FaMo (Fabrice Morandea), dans le but de préparer le congrès universel de Lille. Nous remercions Jeanik qui s'est chargé de trouver un lieu qui convienne et organisa la restauration. Nous fûmes très bien accueillis dans le cadre du Foyer Darwin. Des esperantophones de Tours, Le Mans, Angers et de villages proches de notre département sont venus à cette journée. Avec ardeur et émotion, nous avons étudié et chanté, en espéranto, le répertoire de chansons françaises proposé par le groupe "La Kompanoj" (18 chants retenus). Merci aussi à Fabrice qui avec ferveur et passion nous accompagna à l'accordéon.

D'autres rencontres, similaires à Angers, se sont déroulées :

- Au château de Grésillon durant les stages du groupe "La Kompanoj" et de la chorale Interkant' (voir le compte-rendu de Bruno Robineau "Ek al Lillo kunkantante", page 2).

- Aux halles de Tours, le 30 mai. Nous remercions vivement le club espérantophone local qui nous a gentiment reçu, dans une ambiance joyeuse (3 angevins ont participé). Les murs de la salle ont vibré d'émotion ! Nos amis avaient préalablement préparé nourriture et pâtisseries. Un merci tout particulier à Jeanne qui nous fit découvrir un très bon gâteau local : Le nougat de Tours, qui nous a bien régalié.



Dankon Jean Zay !

Manifestacio ĉe la Panteono

La Franca socio omaĝis al Pierre Brossolette, Germaine Tillon, Geneviève de Gaulle-Anthonioz kaj Jean Zay.

Tiuj kvar gravuloj luktis por libereco, kontraŭ la Hitlera diktaturo. Unu el la unuaj decidoj de la nazia reĝimo estis la malpermeso de la internacia lingvo Esperanto. La 17an de majo 1935, estiel Ministro pri Scienco kaj Edukado de la Tria Reich (Reichsminister), Bernhard Rust dekretis la malpermeson uzi lerneajn lokojn por instrui Esperanton. Kialo : «La subteno al artefaritaj lingvoj kiel Esperanto ne havas lokon en la naci-socialisma ŝtato». Simila decido jam estis prenita en Francio en 1923 fare de Léon Bérard, Ministro pri Publika Edukado. En kontrasto al tiu totalismo, Jean Zay, ministro pri Edukado, per sia cirkulero de la 11a de oktobro 1938, subtenis la instruadon de Esperanto en la kunteksto de soci-educakaj agadoj.

Dankon, Jean ZAY

La mondo de Esperanto omaĝas al vi ĉar vi agnoskis la intereson de la Internacia Lingvo kaj pro via subteno al ties instruado.

La 27an de majo 2015, Esperantistoj ĉeestantaj la procesion de la ĉerkoj alte montris banderolojn «Merci Jean Zay», «Dankon Jean Zay» kaj la 9 literojn formantajn la vorton «ESPERANTO». Inter ili, Elizabeth, instruistino pri Esperanto, kaj Jean-Claude, teknikokomerca inĝeniero, diris : «Ni estas ĉi tie por omaĝi al Johano Zay, kiu en 1938 sendis cirkuleron al



la rektorejoj por permesi la instruadon de Esperanto en lernejoj. Jen detalo komparita al kion li faris aliloke, sed ĝi estas ago tre grava por ni, kiuj laboras por disvolvi la uzadon de tiu lingvo».

Multnombraj ĵurnalistoj fotis kaj filmis ilin : Canal +, France 2, BFMTV, gazetoj 20 minutes.fr kaj La République. La informo ankaŭ pepiĝis tra Twitter.

Informoj ekstraktitaj el retejo Esperanto-France

Manifestation au Panthéon

La France a rendu hommage à Pierre Brossolette, Germaine Tillon, Geneviève de Gaulle-Anthonioz et à Jean Zay.

Ces quatre personnalités ont lutté pour la liberté, contre la dictature hitlérienne. L'une des premières mesures du régime nazi fut l'interdiction de la langue internationale espéranto.

Le 17 mai 1935, en tant que ministre de la Science et de l'Éducation du Troisième Reich (Reichsminister), Bernhard Rust décréta l'interdiction d'utilisation des locaux scolaires pour les cours d'espéranto.

Motif : "le soutien à des langues artificielles telles que l'espéranto n'a pas de place dans l'Etat national-socialiste".

Une décision semblable avait déjà été prise en France en 1923 par Léon Bérard, ministre de l'Instruction publique.

À l'opposé de ce totalitarisme, Jean Zay, ministre de l'Éducation nationale, par sa circulaire du 11 octobre 1938, encouragea l'apprentissage de l'espéranto dans le cadre des activités socio-éducatives.

Merci, Jean ZAY

Le monde de l'espéranto vous rend hommage pour avoir reconnu l'intérêt de la Langue Internationale.

Les espérantophones présents au passage du cortège ont brandi des banderoles «Merci Jean Zay», «Dankon Jean Zay» et les 9 lettres formant le mot «ESPERANTO».

Parmi eux, Elizabeth, professeure d'Espéranto, et Jean-Claude, ingénieur technico-commercial, ont déclaré : "Nous sommes là pour rendre hommage à Jean Zay, qui en 1938 a transmis une circulaire aux rectorats pour autoriser l'enseignement de l'Espéranto à l'école. C'est un détail par rapport à tout ce qu'il a accompli par ailleurs, mais il est très important pour nous, qui travaillons à développer l'usage de cette langue."

De nombreux médias TV les ont photographié et filmé : Canal +, France 2, sur BFMTV. Des articles sont parus dans la presse écrite : 20 minutes en ligne et La République. L'information a aussi été relayée sur Twitter.

Informations extraites du site d'Espéranto-France

Les vélos du bonheur

Pour le prochain congrès mondial à Lille, Bruno Robineau* vous propose une idée de cadeau original à offrir à vos amis, étrangers ou français, que vous rencontrerez là-bas. D'autant plus que ce sera le moment du Tour de France, célèbre dans le monde entier. C'est un travail artisanal : fabriqué à Landemont - Maine-et-Loire - France...

Visitez le site www.velo-du-bonheur.com

qui vous propose plus particulièrement les modèles suivants :

- Le vélo ESPERANTO qui peut se décliner avec 4 mots différents : Esperanto - Dankon - Zamenhof - Amikeco. (ce modèle spécial espérantophones bénéficie d'un prix exceptionnel de 9 € au lieu de 15 €).

- Le vélo PRENOM

(précision : les accents ne peuvent pas être écrits)

- Le vélo COULEURS DE FRANCE

*Je suis à votre disposition
pour répondre à vos demandes.*

*Mi estas je via dispono por
respondi viajn demandojn.*

Bruno ROBINEAU

Le Moulin Boireau - 49270 Landemont - Francio

Tél 33 (0)2 40 98 78 76

www.velo-du-bonheur.com

*Bruno Robineau, grand voyageur, auteur de livres et conférencier :

www.voyage-tourdu monde.com



Pierre : nova emerito



La 4-an de junio, vespere, la membroj kaj geamikoj de la Anĝeva Kultura Centro de Esperanto (CCAÉ) festis restoracie ties eksprezidanton, Pierre Jagueneau. Li delonge kaj vigle rolis por la klubo, unue estiel sekretario dum ses jaroj, kaj poste, estiel prezidanto dum sep jaroj. Inter alie, li estis granda esperantista ambasadoro ĉe la municipo, kaj ĉe diversaj lokaj asocioj (ekz. Festo de la Paco). Ofte kaj bonvole, li disponigis siajn pri-sonteknikajn konojn por helpi la esperantan movadon (Interkant'). Pro tio, dankegon Pierre !

Pierre daŭrigas la instruadon de Esperanto al lernantoj de nia klubo. Ni donacis al Pierre kaj lia edzino Michèle muzikan krozon sur la rivero Maine kaj la riverego Loire. "Ne falu akven, karaj !" diris nia mesaĝo.

Pierre : un nouveau retraité

Le soir du 4 juin, les membres et amis du Centre Culturel Angevin d'Espéranto (CCAÉ) ont fêté leur ancien président, Pierre Jagueneau. Depuis longtemps et avec ardeur, il occupa des postes au sein du club. Tout d'abord, il fut secrétaire durant 6 ans, puis président pendant 7 ans. Entre autres, il fut un grand ambassadeur de l'espéranto auprès de la municipalité et de diverses associations (exemple : La fête de la Paix). Souvent, et bénévolement, il mit à disposition ses connaissances techniques du son

pour aider le mouvement espérantiste (Interkant'). Pour tout cela, grand merci Pierre !

Pierre continue l'enseignement de la langue auprès d'élèves du club.

Nous avons offert à Pierre et à Michèle, son épouse, une croisière en musique sur la Maine et la Loire.

"Ne tombez pas à l'eau, très chers !" était noté sur notre message.

La Anĝeva Kulturcentro de Esperanto akceptis la rusan Esperantiston Aleksandr Melnikov

Instruisto pri Esperanto kaj interlingvistiko, Aleksandr Melnikov regule



prelegas en eksterlandaj universitatoj kaj estas la aŭtoro de libroj kaj artikoloj verkitaj ruse kaj Esperante. La 21-an de aprilo, li prezentis en Anĝevo prelegon pri la urbo Rostov-ĉe-Dono kie li loĝas.

Ĉiuj agnoskas la altan lingvo-nivelon de la preleganto; li helpis la klubanojn plibonigi

sian nivelon kaj montris sin disponebla al ili. Li kapablis kapti la atenton de sia publiko dum sia restado. Aleksandr estas homo simpla, babilema kaj scivolema. Kun plezuro nia klubo regastigus lin. Post tiom longa turneo, Aleksandr ŝajnis mirinde bonfarta. Li konfesis : « Prelego energiigas min ! ». Konservu tiun energion, Aleksandr, por verve kaj talente prezenti viajn multflankajn prelegtemojn kaj gvidi kursojn ie ajn en Esperantujo !

Le centre culturel angevin a reçu l'espérantiste russe Alexandre Melnikov

Professeur d'espéranto et d'interlinguistique, Alexandre Melnikov donne régulièrement des conférences dans des universités étrangères et est l'auteur de livres et d'articles en russe et en espéranto. Le 21 avril, il a présenté à Angers un exposé sur la magnifique ville de Rostov-sur-le-Don, où il réside.

Tous ont reconnu le haut niveau linguistique du conférencier qui a su capter l'attention de son public et s'est montré disponible à ses hôtes et curieux pendant les visites. Alexandre est un homme simple, à la parole facile. Excellent espérantiste, il

Maison Culturelle de l'Espéranto Château de Grésillon



Fin-somera & aŭtuna programo

www.gresillon.org/agendo

01/08 aŭgusto

Lingvoj kaj kulturoj de la mondo.

gresillon.org/s3

08/16 aŭgusto

Festa Semajno por infanoj kaj familioj.

gresillon.org/s4

23 oktobro / 1 novembro

Lingva seminario kun Christian Rivière kaj Janine Dumoulin.

AMO-seminario "Grimpi la monton granitan" kun Stefan MacGill.

01/08 août

Langues et cultures du monde.

gresillon.org/s3fr

08/16 août

Semaine Festive pour enfants et familles.

gresillon.org/s4fr

23 octobre / 1 novembre

Séminaire linguistique avec Christian Rivière et Janine Dumoulin.

Séminaire AMO "Grimpi la monton granitan" avec Stefan MacGill.



adreso : MCE, Grésillon, St.-Martin-d'Arcé, 49150 Baugé-en-Anjou

telefono : 02.41.89.10.34

retpoŝto : kastelo@gresillon.org

**...Oni parolas pri Esperanto...
...On parle de l'espéranto...**

"Un temps de Pauchon", radio elsendo ĉe France Inter, intervjuis Esperantistojn. Jen ligoj por re-aŭskulti :

"Un temps de Pauchon", émission de radio sur France Inter, a interviewé des espérantistes. Voici les liens pour ré-écouter :

<http://www.franceinter.fr/player/reecouter?play=1105419>

<http://www.franceinter.fr/player/reecouter?play=1105415>

<http://www.franceinter.fr/player/reecouter?play=1105417>

aide les groupes à améliorer leur niveau. Notre club le recevra de nouveau avec plaisir. Après une longue tournée en Europe, Alexandre semblait étonnement en pleine forme. "Les conférences me donnent de l'énergie !", admit-il.

Conservez cette énergie, Alexandre, pour présenter avec verve et talent vos conférences multifacettes, et diriger des cours n'importe où dans le monde de l'espéranto !

Nous contacter

Centre Culturel Angevin d'Espéranto

41 rue Pierre Melgrani 49000 Angers

Tél. 02 41 73 17 97 - Courriel : info@esperanto-angers.fr

Vous informer

www.esperanto-angers.fr

www.esperanto-france.org, www.esperanto-jeunes.org

www.uea.org, www.esperanto.net